# KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Jaro 45-a BRAZILO, OKTOBRO-NOVEMBRO-DECEMBRO 2021 N-ro 184



"Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem."
Jesuo (*Mt*, 22:37-40).

"Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro."
Kardec. *La Evangelio laŭ Spiritismo.* Ĉap. 19, §7.

"Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian."
Zamenhof. *La Espero.*

# Retrospektivo 2021 kaj libroprojektoj por 2022





Malgraŭ la pandemio kaj multaj malfacilaĵoj, Eldonejo Lorenz antaŭen marŝis kaj, sen ia dubo, atingis siajn noblajn celojn:

Ni aperigis eldonojn de la bulteno *Komunikoj* kaj la jarlibron *Almanako Lorenz* 2021. Ni tutkore volas danki al ĉiuj verkistoj kiuj bonkore partoprenis per siaj belaj kaj neeldonitaj kronikoj! Ni atentigas la legantojn, ke niaj libroj kaj revuoj estas legataj en pli ol 100 landoj!

Eldonejo Lorenz partoprenis la Virtualan Kongreson de UEA prelegante pri la temo: *Konstruante Katedrojn en la Antropoceno*. Affonso Soares, João Santos, Álvaro Motta kaj Allan Argolo estis la reprezentantoj de Lorenz ĉe la VK.




Ankaŭ en ĉi tiu jaro ni disdonis al niaj hungaraj fratoj, senpage, la libron *A. Küldöttek*, en la hungara lingvo, tradukita rekte el la versio en Esperanto (*La Senditoj*) de la karmemora samideano Szabadi J. Tibor.




## LIBROPROJEKTOJ POR 2022!

Ni jam reviziis kaj aktualigis la tre interesan verkon de Lopes Luna, en la portugala lingvo, *Zamenhof, o iniciador do Esperanto*, kaj ni intencas ĝin eldoni en la proksima jaro; same kiel ni finpreparas la eldonon de la granda vortaro de Allan Kardec Afonso Costa.

Do, karaj geamikoj, ke en la proksima jaro denove ni, finfine, ĉeestu la esperantistajn eventojn brakumante unuj la aliajn en unu "granda rondo familia", kiel instruis la majstro de la konkordo, L. L. Zamenhof. Ke venu 2022!

Feliĉan novan jaron kaj agrablegan Kristnaskon al ĉiuj!

Eldonejo Lorenz

LORENZ

# KRISTNASKO

José Passini

**LA KRISTANA PARTO DE LA HOMARO FESTAS** en la lasta parto de decembro la naskiĝon de Jesuo. Tamen, ne ĉiam tiuj festoj signifas la veran omaĝon al la sublima Sendito de Dio al la Homaro. Estas facile kompreneblaj la agoj de la disĉiploj, kiuj sekvas la lecionojn de sia Majstro, kiam ili montras, ke ili komprenis kaj klopodus ĝuste sekvi Liajn instruojn. Pro tio, oni devas atenti la instruojn kaj ekzemplojn de Jesuo. Ĉu iaj Kristnaskaj festoj signifas veran omaĝon al Jesuo?

Estas facile kompreneble, ke la plej agrabla omaĝo al iu majstro estas la elmontro de tio, ke la ricevitaj lecionoj estas bone kaj efektive aplikataj al la vivo, al la ĉiutaga vivo.

Tiel pensante, ni devus omaĝi al Jesuo ne nur en la Kristnaska Tago, sed dum nia tuta vivo. Nia Kristnaska Festeno devus okazi en la tago, kiam ni montrus al la Majstro la rezulton de niaj klopodoj, celante la aplikadon en nia ĉiutaga vivo, dum la tuta jaro, de Liaj liberigantaj kaj sublimaj instruoj kaj ekzemploj.

Se oni vere meditos pri la instruoj kaj, precipe, pri la ekzemploj de Jesuo, oni facile konkludos, ke la Kristnaska Festo devus celi la senton, la meditadon pri la apliko de la instruoj de Jesuo tra nia tuta ĉiutaga vivo, sed ne nur en specialaj religiaj momentoj.

Resume: se oni deziras sincere omaĝi al Jesuo, oni devas elekti donacojn plej agrablajn al Li. Tiuj donacoj estas fakte faritaj ne nur en iu speciala tago, sed ĉiutage, dum la tuta jaro. Oni devus vivadi ĉiam pensante pri niaj oferoj al Jesuo, ne nur dum specialaj momentoj, ne nur ĉe la Kristnaskaj Festoj.

Ĉe Kristnaska festeno, en la plej sankta templo de la familio: la hejmo, oni devas ne forgesi oferi al la Omaĝito, flanke de brila festeno, bongustajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, mildan muzikon, silenton, pacon kaj mediton pri niaj ĉiutagaj klopodoj, celante sekvi Liajn sublimajn instruojn.


LORENZ

**"KOMUNIKOJ"**

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 45-a • n-ro 184 | Oktobro-Novembro-Decembro 2021

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj



**KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:**
Adreso: Rua Aníbal Bruno, 18 - Santa Cruz
23520-21O - Rio de Janeiro-RJ - Brasil (Brazilo)
Tel. +55-21-98427-8080
Retpago: http://editoralorenz.blogspot.com.br
Retadreso: editora_lorenz@uol.com.br
Fejsbuko: Editora Lorenz






Kompostita de Rogério Mota

# PRI KATASTROFOJ EN NIA MONDO

Paulo Sergio Viana

LA PANDEMIO DE KOVIM-19, kiu ekatakis la mondon en 2020 kaj daŭris pli longe ol oni povus supozi, pensigas nin pri la signifo de kolektivaj suferoj laŭ spirita vidpunkto. Oni povas kompari ĝin al la naturaj katastrofoj (kaŭzataj de vulkanoj, tertremoj, inundoj, k.s.), kvankam iuj sciencistoj esprimas la eblecon, ke almenaŭ parte ĝin kaŭzis la homo mem, en sia neantaŭvidemo. Sendepende de la homa respondeco, ĝi signifas sendube katastrofon, kiu atingis la tutan homaron.

Milionoj da homoj infektiĝis, amaso da homoj mortis, amaso da homoj suferis (suferas) longdaŭrajn sekvojn de la malsano. Malriĉeco kreskis en multaj mondopartoj, malsato plagis, same kiel la viruso mem. Okaze de tiaj ampleksaj fenomenoj, oni tuj pensas pri la "senkulpaj viktimoj" kaj pri la justeco de Dio fronte al tia ĝenerala, vasta suferego.




Revenas al ni la ĉiamaj demandoj: kion signifas tiaj kolektivaj suferoj? Kiel kompreni la sencon de tia fenomeno, se oni kredas pri la konstanta, saĝa, ama gvidado de Dio super la homaj vivoj?

En *La Libro de la Spiritoj* troviĝas pensigaj indikoj pri tiu afero. En la demando nº 737, Allan Kardec demandis:

*- Por kiu celo Dio skurĝas la homaron per detruantaj malfeliĉegoj?*

*- Por ĝin admoni al pli rapida irado. (...) detruado estas necesa por la morala rebonigo de la Spiritoj (...)*

La respondo estas pli ampleksa, sed ni elprenis la esencan informon. La katastrofoj estas rimedoj por morala plibonigo de la homaro. Temas do pri didaktika rimedo. Tio ne signifas, ke Dio ne uzas aliajn, sen tiaj grandegaj suferoj. La instruoj pri la Leĝoj de Dio estas je la dispono de ĉiu bonvolema homo, kaj la elekto inter bono kaj malbono estas libera por ĉiu individuo. Tamen, ĉar la homaro ĝenerale hezitas kaj ne profitas de tiuj instruoj, tiam Dio sendas dolorajn kuracilojn (la tiel nomatajn "punojn") por venki la homan fieron. Suferas virtuloj kaj malvirtuloj, sed ĉiuj fine devos lerni tion, kio estas necesa por ilia morala progreso. La Spiritoj konsilas, ke ni ĉiam konsideru la vivon el la vidpunkto de la spirita sfero, ne de la materia. La materia vivo estas efemera kaj preskaŭ sensignifa, kompare kun la spirita vivo.

La sagaca Kardec plu demandis:

*– Ĉu la detruantaj malfeliĉegoj havas ian utilecon el fizika vidpunkto, malgraŭ la malbonaĵoj, kiujn ili kaŭzas?*

*– Jes, ili iafoje ŝanĝasla staton de iu lando; sed la bonon, rezultantan el ili, ofte sentas nur estontaj generacioj.*

*– Ĉu la malfeliĉegoj ne estus por la homo ankaŭ moralaj provoj, kiuj lin implikas en plej premajn bezonojn?*

*– La malfeliĉegoj estas suferoj, kiuj havigas al la homo okazon, ne nur ekzerci sian intelekton kaj elmontri paciencon kaj submetiĝon al la volo de Dio, sed ankaŭ praktiki siajn sentojn de sindonemo, sinforgesemo kaj amo al sia proksimulo, se lin ne regas egoismo.*

Jen kompletiĝas la instruo de la Spiritoj, kiuj perfekte kongruas kun la situacio de la nuntempa pandemio. Oni povas klare distingi la admonojn:

– La homaro estas kolektivo, en kiu nek unu homo estas pli grava ol alia, nek unu nacio pli valora ol alia. La individua sano dependas de la kolektiva, kaj ĉiu persono devas pensi kaj agi favore al la sorto de siaj kunhomoj. Solidareco estas necesa por la evoluo de la homa gento.

– Oni ne pasive akceptu la pandemion, kvazaŭ ĝi estus fatala volo de Dio. Ĝi estas defio por la homa konduto kaj precipe por la homa scienco, kiu mirinde progresas serĉe de medicinaj solvoj, en tiaj okazoj. Oni nepre apogu la sciencon kaj la edukadon.

– La bezono de socia izoliĝo montris, ke homa kunvivado estas esence grava por la homa mensa sano. Unufoje por ĉiam, ni lernu frate kunvivi en etoso de toleremo, komprenante, ke diverseco de sentoj kaj opinioj tute ne estas baro al interkompreniĝo, sed oportuna okazo por pliriĉigo de niaj spiritaj horizontoj.


– Anstataŭ barakti en senfinaj disputoj pri la surteraj politikaj labirintoj, kiuj kondukas al radikaleco kaj malamo, ni rigardu nian vivon ĉiam el la spirita vidpunkto. Baldaŭ ni revenos al la "vera patrolando", kaj oni demandos de ni: "Kion bonan vi faris al via similulo, homo?"

Unuvorte, la pandemio de Kovim-19 estas interalie granda skuo al nia egoismo.

# ALMANAKO LORENZ 2022

**Verkistoj de Almanako Lorenz 2022, ne forgesu ke la limdato por liveri viajn tekstojn estas 31/12/2021.**

**“Vivu, kresku kaj floru la verda standardo”.**






*Amikoj de Lorenz*

## Maria das Dores Góes (1943)

MARIA DAS DORES GÓES, emerita instruistino, naskiĝis la 24-an de januaro 1943, en Florianópolis, ŝtato Santa Catarina. Ŝi profesie instruis Historion en Florianópolis, Rio de Janeiro kaj Brasília.

Ŝi faris bazan kurson de Esperanto en 1979 ĉe la sidejo de Brazila Spiritisma Federacio, en Brasília. La instruisto de tiu kurso estis Francisco Mattos de Oliveira.

Nuntempe Maria das Dores instruas Esperanton ĉe Brazila Spiritisma Federacio kaj kunlaboras ĉe la Biblioteko Carlos Domingues (sekcio de BEL). Ŝi prezidis Braziljan Esperanto-Asocion.

Maria das Dores estis kasisto de BEL dum tri oficperiodoj kaj estas membro de BEL, UEA, Lorenz kaj ILEI. Ŝi partoprenis plurajn naciajn kongresojn kaj jenajn UK-ojn: Brasília (1981), Kubo (1990) kaj Fortaleza (2002).

Ŝi estas fakdelegito de UEA pri brazila historio kaj ankaŭ fervora spiritistino.

Kunlaboris: Eurípedes Barbosa

# FILO DE PACO

*Antonio Felix da Silva*

“Kaj se tie estos filo de paco, via paco restos sur li; Sed se ne, ĝi revenos al vi.” (Sankta Luko, 10:6).

EN LA MONDO EKZISTAS multaj homoj afliktitaj, ĉar ili estas individuoj arestitaj al malespero. Ili kutimiĝas al la malespero kaj ne volas ŝanĝiĝi. Kelkfoje la paco estas apud ni.

Se ni atentas por observi la kreskaĵaron, belaj kaj koloraj floroj rigardas nin kaj diras: Ni estas ĉi tie. La espero estas ni. Vidu!

Kiom da homoj poseditaj de videbla indigno forkuras de la pacienco? Ili ne scias ke pacienco lumas la animojn de la geedzoj, gefiloj kaj geamikoj.

Se dum la nokto ni levas la okulojn al la ĉielo, ni vidas miriadojn da lumoj. Ili diras al ni: Vidu! Ni estas la lumo de la mondo kaj vi estas kun ni.

Ni forgesas ke oni naskiĝas por esti feliĉaj. La feliĉo estas en ni per la Patrino Naturo, apud la fajro, sidi ĉe la tablo kune nia familio, loĝi ĉe la gepatroj aŭ sole, paroli kun niaj amikoj, familianoj, infanoj, en nia laboro, en lernejo, preĝejo aŭ ĝardeno.

Por ke la homo fariĝu Filo de Paco, li bezonas lerni pri sia interna mondo kaj ankaŭ obei la diajn leĝojn. Tio signifas scii kio ni estas. Se mi konas min, mi estas Filo de Paco.

La vivo sur la Tero estas mallonga. Pro tio ni devas profiti ĉiun minuton por ami kaj bonfari al la aliaj.

# PREĜO DE LA ARBO

Anonima



Vi, kiu preterpasante levas vian brakon kontraŭ mi antaŭ ol kaŭzi ian difekton, observu min bone.

Mi estas varmo en via hejmo dum la longaj ka malvarmaj noktoj de la vintro.

Mi estas amika ombro, kiu protektas vin kontraŭ ardantaj sunradioj de la somero.

Miaj fruktoj satigas vian malsaton kaj kvietigas vian soifon.

Mi estas la trabo kiu subtenas vian domtegmenton tabulo por via tablo, lito sur kiu vi ripozas kaj dormas.

Mi estas tenilo por viaj laboriloj, kaj la pordo de via domo.

Kiam vi nakiĝis, mi liveris lignon por via lulilo; kiam vi mortos, ankoraŭ mi, kiel ĉerko, akompanos vin en la sinon de la tero.

Mi estas fonto de boneco kaj floro de beleco.

Se vi amas min kiel mi meritas, defendu min kontraŭ malprudentuloj.

Respektigu min: Mi estas la arbo.



"Por ĉiu plezuro devas esti mezuro", instruas la popola filozofio.

Ĝi estas invito al modereco, al pozicio sen ekstremeco. Ĉiufoje kiam vi tro entuziasmiĝas kaj prenas troan sintenon, vi falas en la samajn erarojn, kiujn vi kritikas ĉe aliaj personoj.

La ĝusta mezo okaze de diskutado esta ideala situacio.

Ne pro oportuno aŭ timo, sed, ĉar vi ne konas la aferon tiel profunde, kiel ĝi postulas.

Ekvilibra konduto evidentiĝas en la momento, kiam oni prenas decidojn kaj sintenojn.

Libro: Vivo Feliĉa
Spirito: Joanna de Ângelis
Mediumo: Divaldo Pereira Franco

# LA SAGO RETURNIĜAS

Jen li estas sur la supro de la ŝtupoj, fiere rigardante; kun krucigitaj fortaj brakoj, li portas veston pompe nigran.

Li rigardadis siajn povrajn paroĥanojn, sentante la tempan potencon. Li ricevadis oferaĵojn: botelojn, ktp, donacojn de la humila kaj servema popolo.

Lia paroĥo, lia mondo, ĉio estis lia posedaĵo. Kolerema, pro kiu ajn miskonduto li kreskiĝis ene de sia sutano.

Li obeis la tempon, kiu fluas spite ĉion, kaj lia korpo submetiĝas al la aĝo.

Kaj, kiel estas natura en la vivo, ĉion, kion oni faras dum la vivo, tion oni nepre ricevos.

Kaj jam maljuniĝinta, la pastro submetiĝas al la aŭtoritateco de la knabino, kiu lin prizorgadis. Ŝi puŝadis lin de ĉi tie tien, plenumente sian aŭtoritaton de flegistino.

Ni memoru, ke la ago estas kurba sago, kiu estas forte pafata tra la spaco. Ju pli da tempo pasas, kaj ju pli longe oni atendas, ĝi kurbiĝas kaj ĉiam nepre revenas al sia pafinto.

Zorgu, do, ke la sago havu bonajn plumojn kaj sekan pinton.

Ke niaj sagoj estu bonkvalitaj, faritaj el bono kaj el reala sento de karitato.

Spirito: Antônio Francisco
El la portugala tradukis Benedicto Silva
Kunlaboris: João Ângelo)





Zamenhof

# Kuriozaĵoj el la Leteroj de Zamenhof

Al sro P. en Saratov. (0.4. 11-19)

Mi miras, ke mi jam longan tempon havas de Vi nenian leteron. En la lasta tempo mi ofte rimarkas, ke leteroj skribitaj de amikoj al mi aŭ de mi al amikoj perdiĝas en la vojo, kaj de tio ĉi venas neatenditaj malagrablaĵoj. Ricevinte de mi nenian respondon je sia vasta letero, la korespondanto ofendiĝas aŭ timas, ke li estas maloportuna al mi per sia skribado, kaj tial li ĉesigas sian korespondadon. Sed se iu ne ricevas de mi respondon, la kulpo plej parte estas ne mia. Per ĉiu, eĉ per la plej sensignifa, letero la amikoj de nia afero alportas al mi ne malkontenton, sed nur plezuron, kaj mi respondas ĉiun leteron, kiam mi nur trovas minuton da tempo. Tial mi nun uzas la okazon kaj petas ĉiujn, kiuj skribas al mi leterojn kaj ne ricevas respondon, ke ili ne vidu en ĝi ian malĝentilecon aŭ fierecon de mia flanko, sed ke ili diru al si simple: kredeble li ne ricevis mian leteron aŭ mi ne ricevis lian respondon, kaj tial mi skribu al li ankoraŭ unu fojon. Al mi oni povas skribi leterojn eĉ la plej longajn; tamen se mi mem iam skribas tro mallonge aŭ malfrue, oni volu pardoni al mi, ĉar mia tempo estas tre okupita.

L.L. Zamenhof

(Fonto: Iom Reviziita Plena Verkaro de L. L. Zamenhof. Originalaro 1. Unua etapo de Esperanto – 1878-1895. Eldonejo Ludovikito, 1989.)

# Belaĵoj el mia ĝardeno, urbo...



Karaj geamikoj!

Jen nova rubriko de nia bulteno: "Belaĵoj el mia ĝardeno". La unua kunlabori estas la brazila samideanino Sandra Ventura per tre belaj floroj. Gratulon, Sandra!

Se vi, karaj geamikoj, amas la naturon kaj zorgas pri ĝi, sendu al ni mirindaĵojn el via ĝardeno aŭ urbo. Kun granda ĝojo ni ilin aperigos en nia bulteno.

**editora_lorenz@uol.com.br**

# SPECIALA INVITO

Jam estas tempo por realiĝi aŭ aliĝi al nia Asocio por la nova jaro. Per la aliĝo la ano ricevos nian jarlibron, Almanakon Lorenz, la trimonatan bultenon Komunikoj kaj ankaŭ rajtas elekti du librojn el nia katalogo, kaj rabaton de 30% ĉe la aĉeto de niaj libroj. Petu tuj vian aliĝilon: **editora_lorenz@uol.com.br**

(021) **98427-8080**

## SENPAGAJ LIBROJ

**Karaj eksterbrazilaj gelegantoj de Komunikoj en la tuta mondo!**
**Se vi volos ricevi niajn librojn kaj la jarlibron,**
**Almanako Lorenz, tute senpage, per la pdf-a aŭ papera versioj,**
**sendu al ni mesaĝon kun via kompleta nomo kaj poŝtadreso.**
**Kun granda ĝojo ni ilin sendos al vi:**
**editora_lorenz@uol.com.br**

**INTERŜANĜI LIBROJN ANKAŬ ESTAS TRE BONVENA!**
**Vi, kiu ŝatas legi, koni aliajn kulturojn, filozofiojn... jen grava oportuno: Eldonejo Lorenz ne nur sendas, senpage, viajn librojn al niaj eksterlandaj samideanoj, sed ankaŭ akceptas librojn el aliaj kulturoj, filozofioj ktp. Estos granda plezuro ricevi verkojn el diversaj landoj!**

# LA BUFO KAJ LA STELO

Aymoré Vaz Pinto

EN IU LOKO ESTIS BUFO kiu kutime promenadis sur monto dum ĝiaj samuloj saltadis lagdirekten serĉante insektojn por manĝi.

Jam estis konata de la tuta bufaro la manio de la bufo montgrimpisto.

La aro de la bufo en la bordo de la lago similas veran festivalan kunsidon, ili manĝadis, ili kantadis kaj paroladis unu la alian.

En tiu tempo la konversacio de la bufoj temis frekvente pri la nekutima sinteno de la montgrimpista bufo, ĉar ĝi fikse rigardadis steldirekten, dum la tuta nokto.

Ĉiuj el ili mokis ĝin pro la fakto ke ĝi enamiĝis al iu tre bela lumanta stelo.

Iun fojon preterpasis poeto kiu observis tiun nekutiman bildon de la bufo sur monto rigardante stelon.

Ĉiu el ni scias ke la poetoj estas specialaj homoj kiuj kapablas aŭdi stelon. Tiu aserto estis konfirmita ĉar la vizitanto informis ke li aŭdis la jenan dialogon:

— Mi amas vin, sed mi devas rezignacii nur kun viaj karesemaj radilumoj.

— Ne ĝenu pri tio, diris la stelo. Tiu kiu amas gajnas forton por sekvi la elaĉetantan ŝtuparon de la progresso. Kiam vi anĝeliĝos vi estos lumo, kaj tiam, ni restos eterne kune kaj profitos nian amon.

Rigardu la bakterion. Ĉe la mallumo de lagrundo ĝi fiksas la nitrogenon, por ke poste la vivantaj estuloj sukcesu uzi ĝin por subteni siajn biologiajn agojn. La bakterio produktas ankaŭ la vitaminon B12. La homoj ne povas vivi sen ĝi. En tiu senco ni povas diri ke la homoj parazitas la bakteriojn. Do, biologie, kiu el ili valoras pli? Se la homoj scius ke iliaj vivoj dependas de la laboro de la bakterioj eble ili liberiĝus de la fiereco. Ĉiuj el ni estas kunlaborantoj unu de la alia.

— Aŭdante vin, ĉiam mi lernas. Mia scivolemo demandas vin, ĉu estas vero ke oni ne povas vundi floron en la Tero sen ĝeni stelon en la ĉielo?

— La aŭtoro kiu skribis tiun belan frazon ne troigis ĝian signifon, ĉar ĉiuj el ni estas kunligitaj de la dia amo.

La poeto diris ke la dialogo daŭris plu kaj plu.

La enamiĝinta bufo pro la fakto ke ĝi restis longan tempon sur monto ricevante polvon, ĝi rokiĝis. Sed ĝia animo sekvas suprenirante la evoluan ŝtuparon, ŝtupon post ŝtupo, lumdirekten, koranimita de la stela lumo.

Tiu historio estas tute vera, kaj kiel pruvo mi petas vin rigardi la ĉi-suban foton, kiu montras la rokon en bufa formo.

